

# Atestanto de la armea urbo Hiroŝimo

## La 4an de aŭgusto 2020

Tiu ĉi artikolo aperis en la ĵurnalo Asahi la 4an de aŭgusto 2020. Mi tradukos ĝin, aldonante aliajn informojn el ŝiaj aliaj prelegoj en aliaj okazoj.

Iom malproksime de la centro de Hiroŝimo estas kvar grandaj konstruaĵoj faritaj el ruĝaj brikoj. Ili estas eksaj fabrikoj de vestaĵoj apartenintaj al la japana terarmeo. S-ino KIRIAKE Ĉieko vidadis la konstruaĵojn ekde sia infaneco ĝis nun. Ili estis simboloj de la japana gloro kaj poste simboloj de kruelaĵo. Ŝi deziras, ke ili estos konservitaj kiel memoraĵoj de la militoj. Kion ŝi opinias nun?



**S-ino KIRIAKE Ĉieko:** naskiĝis en 1929 en Hiroŝimo. Fininte la kurson de la Virina Kolegio de Hiroŝima (nuna Universitato de Hiroŝimo), ŝi eklaboris en la oficejo de Hiroŝimo. En la aĝo de 85-jaroj ŝi komencis rakonti sian sperton kiel atestanto de la atombombo.

**La eksa vestaĵfabrikaro:** ĝi estis konstruita en 1905 por produkti militistajn uniformojn kaj ŝuojn. La restantaj kvar fabrikaj konstruaĵoj estis konstruitaj en 1913 el ferbetono kaj brikoj surface. La tereno estis 17000 kvadratajn metrojn vasta. Post la atombombado ĝi fariĝis provizora rifuĝejo, kaj poste ĝis 1995 ili estis uzataj kiel studentaj loĝejoj kaj magazenoj. La gubernio Hiroŝimo planas konservi nur la eksteron de la unua fabriko kaj malkonstrui la duan kaj la trian fabrikojn, pretekstante, ke ili estas danĝeraj okaze de eblaj tertremoj. La kvara estas posedaĵo de Japanio.



S-ino KIRIAKE Ĉieko kun lernantinoj

## **Kion signifas tiu fabrikaro al vi?**

--- Mia hejmo estis tuj apud la ĉefa pordego de la fabrikaro, do ĉiun matenon mi vekigis per la paŝbruoj de la laboristoj, kiuj vizitis la fabrikojn. Mia patrino laboris en la kassekcio de la fabrikaro, tial mi estis vartita en ĝia infanvartejo.

Kiam mi estis en la dua lernoĵaro, komenciĝis la milito inter Japanio kaj Ĉinio. La bruoj “da, da, da!” el la kudromaŝinoj aŭdiĝis eĉ ekstere. En la terenon venis ŝarĝvagonoj kaj oni transportis grandan kvanton de la vestaĵoj al la haveno. Nun restas nur kvar fabrikaj konstruaĵoj, sed tiam estis multaj aliaj konstruaĵoj kaj la tereno estis tre granda.

Oni nutris kuniklojn. Mi ĝoje donis al ili foliojn de karotoj kaj rafanoj. Estis diveraj specoj de kunikloj. Oni diras, ke ili estis uzataj por esplori, kiu speco havas la plej bonan kvaliton por tenadi varmon por subŝtofo de soldataj manteloj. Troviĝis grandaj banejoj. Tiun tempon la terarmeo havis grandan buĝeton. Mi sentis ĝian potencon.

## **Kiam la dua mondmilito komenciĝis kaj la situacio fariĝis malbona, vi estis mobilizita al la fabrikaro. Kion vi faris tie?**

--- En Hiroŝimo estis tri fabrikaroj, fabrikaro por vestaĵoj, fabrikaro por armiloj kaj fabrikaro por proviantoj. Mi estis lernanto de la virina supera mezlernejo de Hiroŝimo, sed mi lernis nur en la unua lernoĵaro. Poste mobilizite, mi laboris en tiuj tri fabrikaroj. En la vestaĵfabrikaro mi komence kudris soldatajn uniformojn per kudromaŝino.

Kiam proksimiĝis la fino de la milito, mi lavis uzitajn vestaĵojn. De tempo al tempo mi lavis uniformojn kun kuglotruoj. La alia flanko de tiuj vestaĵoj estis makulita de sango.

Ni metis tiujn sangomakulitajn vestaĵojn sur la lavtabulon kaj per sapo kaj broso ni lavis ilin, kaj kiam ili estis sekigitaj, ni flikis ilin. Eble jam mankis materialoj por fari novajn uniformojn.

Mi demandis mian instruiston, ĉu Japanio povos venki, kaj li respondis, “Se vi eldiros tiajn malbonaŭgurajn vortojn, la sprito de tiuj vortoj kondukos nin al tiu malbona situacio”. Aŭdinte lian respondon, mi decidis fermi mian buŝon.

En 1944 mi estis mobilizita al tabakfabriko. Mi plendis, ke tabako ne utilas por milito, kaj la instruisto respondis, “Tabako estas necesa por soldatoj. Kiam ili estas subpremitaj de laciĝo, tabako revivigas ilin. Vi faru tabakon, kredante tion”.

## **Kaj venis la 6a de aŭgusto**

--- Tiun tempon mi estis mobilizita al la tabakfabriko, kio savis mian vivon. Ĉiun tagon, sen feriaj tagoj, mi starante laboris, pro kio mi suferis pro artrito. Jam en julio mi ekvizitis hospitalon. Tiun matenon, komence mi vizitis la fabrikon. Ni ĉiuj laboristoj direktis nin al la imperiestra palaco en Tokio kaj kultis la imperiestron. Poste mi ekiris al la hospitalo je la 8a horo. Survoje, kiam mi paŭzis ĉe apuda dometo du kilometrojn for de la epicentro de la atombombiĝo, eklumegis kaj mi estis faligita kontraŭ la

tero kaj svenis. Tiam estis la 8a horo kaj 15 minutoj. Kiam mi reakiris konscion, mi kuŝis sub la falinta dometo. Bonŝance mi povis elrampi el la detruaĵoj. Antaŭ la atombombado, jam estis nuligita alarmo kontraŭ usona aeratako, do mi ne povis kompreni, kio okazis.

Komence ĉirkaŭ mi estis mallume. Baldaŭ heliĝis kaj mi povis vidi la ĉirkaŭon. Ĉiuj domoj laŭ la strato, laŭ kiu mi ĵus paŝis, estis detruitaj. Sur la ponto, kiun mi intencis trapasi, mi vidis homojn kuri al la sudo, kie ankoraŭ ne estis fajro.

Mi revenis al la tabakfabriko, sed por tio mi bezonis 50 minutojn anstataŭ 15 minutojn, ĉar la stratoj malaperis. Neniu estis en la fabriko krom unu amikino, kies kapo multe sangis. Ankaŭ sur ŝia kolo sangis pro enpikiĝintaj vitraĵpecoj. Mi faris sukuradon al ŝi. Tiam ŝi diris al mi, “Ankaŭ vi vundiĝis”, kaj ŝi donis al mi sukuradon.

Ni ne vidis fajron en la distrikto Uĵina, tial ni celis nian lernejon tie. La lerneja konstruaĵo ne estis difektita. Al la lernejo pli kaj pli revenis lernantinoj en la 1a kaj la 2a lernojaroj. Ili estis mobilizitaj al la loko 2 kilometrojn for de la epicentro por malkonstruado de domoj por fari vakajn spacojn por malhelpi disvastiĝon de fajro okaze de usonaj aeratakoj. Ili ĉiuj estis severe vunditaj kaj preskaŭ nudaj, ĉar la vestaĵoj estis forbruligitaj. Iliaj haŭtoj estis disŝiritaj el la korpo, pendantaj de la fingroj aŭ tiritaj sur la tero ĉe iliaj piedoj kiel undarioj.

Kiam instruistoj tranĉis ĝin per mano el iu lernantino, ŝi respondis per febla voĉo, “Dankon. Nun mi povas paŝi”. Kiam ni metis ŝin sur la tablon, provizoran liton, ŝi diris,

“Panjo, paĉjo”, kaj havis tre trankvilan mienon kaj mortis.

### Pentraĵo desegnita de atombombito 1



La 6an de aŭgusto. Mia filino laboris por malkonstruado de domoj malantaŭ la urba oficejo de Hiroŝimo, kaj vundiĝis tutkorpe. Ŝi fuĝis kun siaj amikoj. Survoje ĉe la ponto Minami unu soldato donis al ŝi tukon el kurteno, per kiu ŝi kovris sian korpon. Ŝi atingis la aerodromon Joŝijima. Ŝi jam fariĝis blinda kaj ne plu moviĝis. Ŝi surportis mantelon donitan de bonkorulo, kaj kriante “Panjo, panjo”, ŝi mortis ĉirkaŭ la 3a horo.

Mi desgnis, kian sperton mia filo havis, laŭ la informo donita al mi. Mi preĝas por ŝi. Murakami Misako 75-jara.

En la lernejo troviĝis nek kuracisto, nek medikamento. Tion, kion ni povis fari, estis nur ŝmiri malnovan oleon

konservitan en la kuirejo. Ni, revenintoj el la tabakfabriko, faris tian sukuradon al la vunditoj, sed ili sinsekve mortis post angoro.

Tiamaniere lernantinoj mortis unu post la alia. Ni devis bruligi ilin en la angulo de la sportejo. Mi rompis kadrojn de la fenestroj kaj faris brullignojn. Ni verŝis sur la kadavrojn pezan oleon el la armeo. Kiam la fajro kovris la kadavrojn, stomakoj kaj instestoj plenaj de aero eksplodis same kiel paneiĝo de biciklaj pneŭmatikoj. Tiam la membroj moviĝis. “Ili ankoraŭ vivas!” Mi konsterniĝis. La instruisto ordonis, ke mi ne vidu, sed mi estis ŝtoniĝinta kaj tremante vidis la scenon. Iliaj ostoj estis hele rozkoloraj. Vidante ilin, mi la unuan fojon larmis.

Mi kovris la ostojn per papero kaj redonis ilin al la gepatroj, dirante, “Pardonon. Mi pluvivis!” Antaŭ la milito mi povis manĝi bongustaĵojn kaj iom lerni en lernejoj, sed tiuj mortintaj lernantinoj pli junaj ol mi ne povis manĝi tiajn kaj estis ĉiam malsataj. Ili ne povis lerni, sed anstataŭe laboregis por la milito kaj fine mortis brulvundite. Ili estis la plej malfeliĉaj, sed ankaŭ ni, pluvivintoj, estis malfeliĉaj.

En septembro mi suferis pro akuta radioaktiva malsano. Multaj homoj, kiuj ne vundiĝis, suferis pro ĝi kaj mortis, tial mi tre timis. Sed ĝis la nova jaro 1946 mi saniĝis kaj sur mia kapo ekkreskis haroj. En la postaj jaroj mi suferis pro utera kancero kaj ovaria tumor. Ankaŭ nun mi suferas pro tiroida malsano kaj ĉiun tagon mi prenas medikamenton por ĝi. Ofte mi fartas malbone.



## Pentrajo desegnita de atombombito 2



La 7an de aŭgusto mi bruligis la 3-jaran filinon Naoko. Mi ne povis deteni min de larmado. “Mi baldaŭ sekvos vin. Vi atendu min!” Mi preĝis. Mi ankoraŭ ne trovis la 9-jaran filon. Mi kredis, ke li ĉiel vivas ie.

El la kadavro aperis granda kvanto de graso. Mi bruligis la filinon, kiu estis ĝis tiam tre sana. Mi ne povis vidi ŝin. Mi estis kvazaŭ freneza. Mi ne kredis, ke tia afero vere okazas en tiu ĉi mondo. Infero!

30 jaroj pasis. Petadante pardonon al miaj du gefiloj, mi vivis. Kiu estas kulpa? Pardonon! Mi ne plenumis promeson, ĉar mi ne havis kuraĝon. IŜIBURO Tamaki (la urbo Oohira, Hiroŝimo)

\*Eble, bruligante sian filinon, li promesis al ŝi, ke li sinmortigos por sekvi ŝin, sed li ne plenumis sian promeson.



## **Kio okazis al viaj familianoj?**

--- Mia avino vundegiĝis hejme. La elementa lernejo estis registrita kiel rifuĝejo, sed ĝi estis detruita, tial mia patrino portis ŝin al la magazeno de la vestaĵfabriko. Kiam mi alvenis tien, jam estis armea kuracisto kaj mia avino estis kovrita per bandaĵo.

Post nelonge multaj homoj fuĝis tien, kaj la magazeno fariĝis plena de malbonega odoro de sango kaj fekaĵoj. Tiun sperton la poeto TOOGE Sankiĉi esprimis en sia poemo “Raporto pri la magazeno”. Mi spertis samon kiel li. Mia avino ne povis toleri la odoraĉon kaj insistis, ke ŝi estu ekstere, eĉ se ŝi mortos. Ni sternis pajlmaton en la libera spaco antaŭ la magazeno kaj pasigis tie du, tri noktojn.

\* Tooge Sankiĉi (1917-1953). Kiam la atombombo estis faligita, li estis 3 kilometrojn for de la epicentro. En 1951 li mem eldonis la poemaron “Poemaro de la atombombo” kaj famiĝis. La poemo “Raporto pri la magazeno” temas pri tio, kio okazis en la magazeno ĉiun tagon dum la unua tago de la tragedio kaj la 8a tago. Komence la magazeno estis plena de vunditoj, sed iom post iom ili mortis kaj en la 8a tago ĝi estis jam preskaŭ senhoma.



**Kial vi komencis rakonti tiun sperton kiel atestanto de la tragedio, kiam vi estis 85-jara? Mi aŭdis, ke antaŭ tio vi nur rakontis la sperton al la lernantoj, kiuj vizitis la cenotafon pri la tragedio en via lernejo.**

--- Post la milito, mi estis okupita, laborante en la urba oficejo, edziniĝinte, naskinte bebojn, kiujn mi vartis, kaj helpinte la eldonejon administratan de mia edzo. Krome mi ne emis rememori la mizeraĵojn. Tamen lastatempe mi sentis teruron, vidante la regantajn politikistojn, kiuj ignoras nian pacan konstitucion kaj sekvas la militeman politikon de Usono.

Kiam homoj forgesas kruelaĵojn de militoj, ili ripetas samon. Mi ekpensis, ke se ni ne transdonas niajn spertojn kaj kruelaĵojn de la milito al junaj generacioj, denove okazos teruraĵoj. Kiam mi estis 85-jara, la unuan fojon mi ekpensis tion serioze. La lastan jaron mi lernis en la kurso por rakontistoj pri la tragedio, kaj komencis rakonti mian sperton al la lernantoj, kiuj vizitas la Pacmuzeon de Hiroŝimo.

### **Kiam vi rakontas vian sperton, vi komencas rakonti ankaŭ la historion antaŭ la jaro 1945. Kial?**

--- Hiroŝimo situas sur la delto de la 5 riveroj, do la tero kun salo ne estas fekunda. La urbo progresis ne pro bona rikolto, sed pro la militoj. Kiam okazis la Japan-Ĉina Milito, la Imperiestra Ĉefstabejo situis ĉi tie. El la haveno de Hiroŝimo soldatoj estis senditaj al Ĉinio kaj aliaj aziaj landoj. Lernantoj estis mobilizitaj al la haveno kaj kuraĝis la soldatojn per la japana flago kaj krioj “Vivu Japanio!”

La vestaĝfabrikaro estis simbolo de la japana militarismo ĝis la fino de la dua mondmilito. Hiroŝimo estis arma urbo kaj antaŭ la tragedio de la atombombado ĝi estis unu el la grandaj motoroj por la japana invado al

aliaj landoj. Se ni ne rakontus tiun historion kaj nur rakontus, ke Hiroŝima estas plorinda, atombombita ubro, alvokante pacon, tio estus sensignifa. Tial mi rakontas la historion antaŭ la tragedio.

**La gubernio Hiroŝima planas malkonstrui la 3 konstruaĵojn krom unu, kiu staras la plej proksime de la epicentro, insistante, ke unu konstruaĵo estos sufiĉa kiel la atestanto de la tragedio. Kial vi opinias, ke ĉiuj 4 konstruaĵoj estu konservitaj?**

--- Tiu atombombita vestaĵfabrikaro estas valora atestanto de la milito. Iuj ja ne volas vidi ĝin, ĉar ĝi rilatas al la



milito. Same post la milito iuj postulis, ke tiu Atombombita Domo (foto) estu malkonstruita, tamen se tiuj konstruaĵoj estos malkonstruitaj, ili perdiĝos eterne.

Sub la Pacparko, kie staras tiu Domo, subtere troviĝas multaj ostoj, ĉar antaŭe tie estis prospera kvartalo. Oni ne povis klekti ĉiujn, do ili ankoraŭ restas tie. Ĝi estas kvazaŭ tombejo por mi, do kiam mi vizitas la parkon, mi preĝas por ili kun la vorto “Pardonon!”

Eĉ post kiam la spertintoj de la militoj malaperos, tiuj konstruaĵoj restos kaj rakontos la tragedion. Mi forte deziras, ke la 4 vestaĵfabrikoj estu konservitaj kiel silentaj

atestantoj de la milito. Por tio mi eĉ volas alvoki la kunlaboron al la mondo.

### **Ĉu Japanio nun estas paca?**

--- Mi sentas ion malagrablan en nia socio. Homoj komencis suspekti aliajn, ekzemple, kritikante tiujn, kiuj ne sekvas la instrukciojn de la registaro pri la koronavirusa epidemio, diras, “Ili estas perfiduloj, disŝetante koronaviruson!” aŭ “Ne vizitu suspektindajn drinkejajn kvartalojn, kiuj estas epicentroj de la viruso”. Mi rememoras, ke ankaŭ antaŭe estis memgardaj grupoj, kiuj gvatas najbarojn kaj suspektindulojn. Nun ne nur junuloj, sed ankaŭ maljunuloj opinias, ke Japanio estas paca lando, sed ĉu Japanio estas vere paca? Ekdisvastiĝas malegaleco en nia socio, ekzemple malegaleco inter riĉuloj kaj malriĉuloj, malegaleco inter viroj kaj virinoj. Tiuj malegalecoj povos fariĝi bazoj por komenci militojn. Ni devas forviŝi tiujn malegalecojn.



Mia avino malamis Usonon. Ankaŭ mi, sed poste mi komencis opinii, ke ni ne redonu malamon al malamo kaj ne venĝu min per armiloj. Estas la plej grave klopodi por ke ne okazu milito. Paco ne venos al tiuj, kiuj sidas silente. Ni devas altiri ĝin al ni per nia tuta forto kaj protekti ĝin. Mi volas, ke ĉiuj komprenu tion. Se ne, paco tuj malaperos kiel ŝaŭmo.

### **Post la intervjuo:**

Tiuj, kiuj spertis tiun tragedion, jam estas ĉirkaŭ 90-jaraj. Baldaŭ venos la tempo, kiam ni ne povos rekte aŭskulti iliajn rakontojn. Same konstruaĵoj, kiuj spertis la tragedion, estas malkonstruitaj unu post la alia por “kontribui al la ekonomia progreso”. En tiu situacio feliĉe aŭ malfeliĉe tiu vestaĵfabrikaro ekzistas, ne tuŝite. “Ĝi estas tro granda aŭ por konservi ĝin, aŭ por malkonstrui ĝin”, diras s-ino Kiriake.

Ŝi komencis rakonti al mi la memoron de la vestaĵfabrikaro kun ridetoj, sed kiam ŝi rakontis la spertojn pri mobilizado kaj la atombombado, ŝia mieno malĝojiĝis. Grandega muro kaj deformiĝinta fera pordo de la vestaĵfabrikaro kune kun ŝi rakontis la tragedion al mi.

Komenca braveco de la milito kaj finaj kruelaĵoj, tio estas unu serio de historio. Tion rakontas la konstruaĵoj. La homa vivo havas limon, sed konstruaĵoj havas eternan vivon, se homoj decidas konservi ilin.

(Intervjuisto: s-ino MIJAZKI Sonoko)